ĉambro por du personoj	11,85 €	chambre pour 2 personnes
ĉambro por tri personoj	10,80 €	chambre pour 3 personnes
ĉambro por kvar personoj	8,10 €	chambre pour 4 personnes
konuna dormejo		dortoir
Tendumejo (sen elektro)	4,00 €	Camping (sans électricité)
por ĉiu persono	3,00 €	pour une personne
por ĉiu alia persono de la familio		pour chaque autre personne de la famille
Manĝo (1/2 prezo ĝis 16 jaroj)	2,60 €	Repas (1/2 tarif jusqu'à 16 ans)
malmenanĝo	8,40 €	petit déjeuner
tagmanĝo	7,80 €	déjeuner
vespermanĝo		dîner
makarna manĝo - pikniko	4,70 €	repas froid - pique-nique

ALIĜILO / BULLETIN D'INSCRIPTION

(por unu persono / par personne)

Nomo / Nom.....ret-skatolo/courriel.....

Naskiĝdato / Date de naissance.....

Adreso / Adresse.....

Datoj de la stagĝo / Dates du stage.....ret-skatolo/courriel.....

interesa pri la kurso nivelo 1/2/3..... / intéressé par le cours niveau 1/2/3.....

Mi loĝos en ĉambro / Logement en chambre ; de 1/2/3/4+ litoj/lits // camping.....

trankviloj/nuits : unua/1^{ere}lasta/dernière :

manĝoj / repas : unua/1^{er}lasta/dernier..... Vegetariano / Végétarien

mi venos aŭte/buse/almaniere//je viens en voiture/bus/autrement

Mi pagas per ĉi-kuna ĉeko je la sumo de

UEA-konto **gras-y** kun indiko "stagĝo"

Je joins un chèque postal bancaire au nom de la Maison Culturelle de l'Espéranto


Il est possible de payer par Chèques Vacances

Bonvolu sendi aliĝojn kaj ĉekojn al : **Maison Culturelle de l'Espéranto**

Veuliez envoyer inscriptions et chèques à : **Grésillon F-49150 BAUGÉ**

ato / date : Subskribo / signature :

KULTURDOMO DE ESPERANTO MAISON CULTURELLE DE L'ESPÉRANTO



Kastelo Grezjono / Château de Grésillon
49150 BAUGÉ Francio / France
 ☎ : +33 (0)2 41 89 10 34
 (+ respondilo / répondeur)
 ret-skatolo/courriel : kastelo@gresillon.org
 retejo/site : <http://gresillon.org>

La senprofitcela asocio
"Kulturdomo de Esperanto"
 fondita en 1951, posedas la
 kastelon Grezjono kaj
 ĝian 18-hektaran parkon
(simple komforto).


L'association à caractère coopératif
"Maison Culturelle de l'Espéranto"
 fondée en 1951, est propriétaire du
 château de Grésillon et de son parc de
 18 hectares *(niveau de confort simple).*

- Ĝi ĉiujare proponas :
- ♦ kursojn diversgradajn
 - ♦ prelegojn diverssternajn
 - ♦ distraĵojn diversspecajn
 - ♦ ekskursojn en belega regiono
- Ĝi disponigas al la stagĝanoj :
- ♦ kurso-ĉambrojn, salonojn
 - ♦ ampleksan bibliotekon
 - ♦ libroservon
 - ♦ butikon kaj trinkejon
 - ♦ sportejoj (tenisbaloj, flugpilkejo, 2 mĝradpadoj...)

- Ĉaque année elle propose :
- ♦ des cours de la langue internationale (divers degrés)
 - ♦ des conférences de toutes sortes
 - ♦ des distractions variées
 - ♦ des excursions dans une très belle région
- Elle met à la disposition des stagiaires :
- ♦ des salles de cours, des salons
 - ♦ une bibliothèque importante
 - ♦ un service de librairie
 - ♦ une boutique et un bar
 - ♦ des équipements sportifs (tennis de table, volley-ball, 2 sentiers de randonnées...)

PROGRAMO 2006 PROGRAMME 2006

Programo Programo 2006



STAĜOJ / STAGES 2006

Datoj Dates	Kursoj (1a, 2a, 3a gradoj)/Cours (1 ^{er} , 2 ^{ème} , 3 ^{ème} année degrés) Aliaj Aktivaĵoj / Autres Activités (AA)
29 aprilo/avril ⇨ 6 majo/mai	2/3 Anna Lowenstein verko-semajno/semaine d'écriture kontakto : Christian Rivière, tel 02.40.25.24.05
08 ⇨ 15 julio/juillet	1 Carlo Bourlot (Italio) baza esperanto per duonrekta metodo + Mazi en Gondolando mezrekta metodo 2 Jean-Luc Kristos (Francio) simpla, parola komunikado ĉiutaga en etosa ĝoja, ludema kaj feriena 3 Christian Lavarenne (Francio) seminario pri historio de Esperanto AA <i>Franjo Lévéque-Provost : kantado + eblaj individuaj kursetoj pri klasikaj kantoj (eĉ por komenccantoj)</i>
15 ⇨ 22 julio/juillet	1 Carlo Bourlot (Italio) baza esperanto per duonrekta metodo + Mazi en Gondolando mezrekta metodo 2 Tatjana Loskutova (Rusio) paroliga kurso 3 Gerrit Berveling (Nederlando) seminario pri historio de poezio en Eŭropo ĝenerale, kaj pri originala Esperanto-poezio AA <i>Michelle Pelolle : puntarado per bobenoj (+ 15 €/persono)</i>
22 ⇨ 29 julio/juillet	1 Carlo Bourlot (Italio) baza esperanto per duonrekta metodo + Mazi en Gondolando mezrekta metodo 2 Tatjana Loskutova (Rusio) paroliga kurso 3 André Cherpillod (Francio) literatura tradukado por franglingvanoj
29 julio/juillet ⇨ 05 aŭgusto/aôût	1 Tatjana Loskutova (Rusio) 2 Jean-Luc Kristos (Francio) simpla, parola komunikado ĉiutaga en etosa ĝoja, ludema kaj feriena 3 Jean-Luc Tortel (Francio) preparado al la Kapableco
05 ⇨ 12 aŭgusto/aôût	1 Gérard Clément (Francio) per vigla Fêrez metodo aŭ Cseh-metodo 2 Grazina Opulskiene (Litovio) paroliga kurso per Cseh-metodo 3 Przemek Grzybowski (Pollando) pedagogia seminario por esperanto-instruantoj/instruontoj AA <i>Marie Savary : joko + rilataj kursetoj pri masaĝoj...</i>
12 ⇨ 19 aŭgusto/aôût	1 Abdurahman Junusov (Dagestio) 2 Grazina Opulskiene (Litovio) paroliga kurso per Cseh-metodo 3 François Simonnet (Francio) trejnado pri tradukado parola kaj skriba 2/3 Yasuo Hori (Japanio) seminario pri Japanio AA <i>Christian Rivière : ĝo-ludo</i> ne hezitu veni kun ludiloj, muzik-instrumentoj, ... vidu nian retejon pri eblaj kromaj programeroj

LA STAĜOJ

Komenco :

- staĝo : sabaton je la 19-a horo
- kursoj : dimanĉon

Disvolvigo

- ĝis 5 horoj da kursoj ĉiutage
- aktivaĵoj (esperante) : malkovro de la regiono, prelegoj, atelieroj (laŭ la semajnoj), sportoj

Fino

- kursoj : vendredon vespere
- staĝo : sabaton tagmeze (manĝo : opcie)

LES STAGES

Début

- stage : samedi 19 h
- cours : dimanche

Déroulement

- jusqu'à 5 heures de cours par jour
- activités (en espéranto) : découverte de la région, conférences, ateliers (selon les semaines), sports

Fin

- cours : vendredi soir
- stage : samedi midi (repas optionnel)

KROMAJ EVENTOJ :

15 ⇨ 22 aprilo/avril	FRINGOJ (Festa Renkonto Internacia de Geknaboj) kontakto : Elisabeth Barbay, tel : 01.48.47.23.87 eliz.babay@wanadoo.fr
20 ⇨ 27 aŭgusto/aôût	FESTO (Junulara Renkonto) kontakto : ESPERANTO-JEUNES, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS http://festo.esperanto-jeunes.org

Vi povas veni ĉiutage ĝis Angers aŭ Saumur aŭ La Flèche ; buse ĝis Bauge. Ne hezitu kontakti nin letera, telefona aŭ rete por pli da informoj.
Vous pouvez venir en train jusqu'à Angers, Saumur ou La Flèche ; en bus jusqu'à Bauge.
N'hésitez pas à nous contacter par courrier, par téléphone ou par courriel pour informations complémentaires.

1- Se vi mangos en feriejo « Le Lazaret » :
 Ĉu vi estas vegetarano ? Jes

1- Si vous mangez au « Lazaret »
 Êtes-vous végétarien ? Oui

2- Mi sekvos la kurson :
Je m'inscris au cours suivant :

- por komencantoj (*pour débutants*)
- paroligian kurson (*cours 2^{ème} degré*)
- perfektigan kurson (*perfectionnement*)

3- Ĉu vi volas ekzameniĝi ?

jes

Kiu ekzameno ?
Vous voulez-vous passer un examen ?

oui
 Quel examen ? :

Por ĉiaj klarigoj, telefonu :
Pour tous renseignements, téléphonez à :

Francio 04 67 54 15 43

fakso fax : 04 67 54 15 43

au ou : jf.passarella@free.fr

Noru ĉi-tie vian ret-adreson :

Notez ici votre adresse internet :

«

INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO

ESPERANTO, KULTURO KAJ PROGRESO
 proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon
 pri Esperanto.

Profitu, samtempe trapasi agrablajn feriojn en
 la havenurbo SÈTE, en ripoza parko de pluraj
 hektaroj ĉe Mediteranea bordo, dum ideala
 periodo pro la bona vetero sed ekstere de la
 somera troa homamaso.

Ĉe ni, vi ĝuos plurnivelajn kursojn kaj ankaŭ
 banadon, ekskursojn kaj ... bonan manĝaĵon

SÉJOUR LINGUISTIQUE EN BORD DE MER

ESPÉRANTO CULTURE ET PROGRÈS vous
 propose d'apprendre ou de vous perfectionner
 en Espéranto.

*Profitez-en pour passer en même temps
 d'agréables vacances à Sète, dans un parc
 reposant de plusieurs hectares au bord de la
 Méditerranée pendant une période idéale
 jouissant d'un temps agréable et en dehors de
 l'afflux estival.*

*Chez nous, vous pourrez suivre des cours de
 plusieurs niveaux mais aussi profiter de
 baignades, excursions et.... bonne table*

INTERNACIA SEMAJNO ĈE MEDITERRANEO

de la 19-a ĝis la 26a de
 aŭgusto 2006

Stago en Sète
 (Francio)

<http://perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto.html>

32-a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO
32ème SEMAINE INTERNATIONALE D'ESPÉRANTO
19/08/2006 - 26/08/2006 Le LAZARET SÈTE (Francio)

Adreso dum la semajno :
Adresse pendant le séjour :

Maison Familiale « Le Lazaret »

La Corniche, rue du Pasteur Benoit 34200 SÈTE (Francio)
tel : 33(0)4 67 53 22 47 fax : 33(0)4 67 53 36 13

Programo :

Matene : diversnivelaĵ kursoj

Posttagmeze : ekskursoj, kursoj aŭ libera tempo

Vespere : distraĵ kaj kulturaj programoj

Ekskursoj : multaj eblecoj surloke

Programme :

Matinée : cours de plusieurs niveaux

Après-midi : excursions, cours ou temps libre

Soirée : programme culturel ou divertissements

Excursions : nombreuses possibilités sur place

Aliĝkotoj : 55 Eu. antaŭ la 1-a de majo 2006
70 Eu. post tiu dato

senpaga por malpli ol 26 jaraĝaj

Loĝado : pluraj eblecoj

- En « Lazaret » jen la prezoj por unu
semajno : ĉambro kaj 3 manĝoj tage

La feriejo taŭgas por rulseĝuloj

Adhèsions : 55 Eu. avant le 1^{er} mai 2006

70 Eu. après cette date

gratuit pour les moins de 26 ans

Logement : plusieurs possibilités

- Au « Lazaret », prix pour une semaine : chambre

et 3 repas par jour

Locaux adaptés pour fauteuil roulant

1 persono en unupersona ĉambro : 396 Eu.

1 persono en dupersona ĉambro : 305 Eu.

1 persono en familia ĉambro : 277 Eu.

prezoj por infanoj laŭ peto

1 personne dans une chambre d'une personne : 396 Eu.

1 personne dans une chambre de 2 personnes : 305 Eu.

1 personne en chambre familiale : 277 Eu.

tarif pour enfants sur demande

Mendo de loĝado: post antaŭpago de 100 Eu.
antaŭ la 15 07 2006

Réservation: après paiement d'un acompte de 100 Eu.
avant le 15 07 2006

- Eblas tendumi en la ĉirkaŭaĵo

- Multaj hoteloj en la urbo

- Possibilité de camping en dehors de la ville

- Nombreux hôtels en ville

Aliĝoj, klarigoj, mendoj je :

ESPERANTO CULTURE et PROGRÈS: 5, rue du docteur Roux FR-34090 MONTPELLIER

tel/fakso : 33 (0)4 67 54 15 43

Postkonto/CCP : n° : MON 73 73 65 E

jf.passarella@free.fr

!!!! Konservu tiun parton !!!!!!! Conservez cette partie !!!!!!!

Inscriptions, renseignements, réservations à :

ESPERANTO CULTURE et PROGRÈS: 5, rue du docteur Roux FR-34090 MONTPELLIER

tel/fakso : 33 (0)4 67 54 15 43

Postkonto/CCP : n° : MON 73 73 65 E

jf.passarella@free.fr

!!!! Konservu tiun parton !!!!!!! Conservez cette partie !!!!!!!

32-a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO
32ème semaine internationale d'Espéranto
SÈTE (Francio) 2006-08-19 / 2006-08-26

ALIĜILO BULLETTIN D'INSCRIPTION

Familia Nomo

Nom

Persona Nomo

Prénom

Adreso

Adresse

tel.num. :

n° tél

Mi loĝos en feriejo « Le Lazaret »

Je logerai à la Maison « Le Lazaret »

Mi antaŭtendas unu liton Je réserve un lit

en unu persona ĉambro

dans une chambre d'une personne

en dupersona ĉambro

dans une chambre de 2 personnes

en familia ĉambro

en chambre familiale

Mi ne loĝos en Lazaret sed mangos regule tie

Je ne logerai pas au « Lazaret » mais j'y

mangerai régulièrement

Sendu la aliĝilon al : Envoyez ce bulletin à

ESPERANTO CULTURE et PROGRÈS

5, rue du docteur Roux


FR-34090 MONTPELLIER Francio

Pagu al : Esperanto Culture et Progrès

Payez à : CCP n°: MON 73 73 65 E

ATENTU: Bonvolu aldoni koverton kun adreso

ATTENTION:joindre une enveloppe avec adresse



ETAIN (55400) ————— ☆

Okaze de la 90-a datreveno de la *Verduna batalo (1916)*, la infanoj kaj junuloj de la baz- kaj mezlernejoj de la departemento *Meuse (55)* estis invitataj labori dum tiu lernejar-jaro pri la historiaj memorlokoj, kiuj koncernas la *Unuan Mondmiliton (1914 / 1918)*.

1300 gelernantoj respondis jese al tiu-ĉi invito, esplorante siajn vivmediojn por trovi spurojn de la tiel nomita "Granda Milito" ! Iliajn verkojn, fotojn, dokumentojn oni povas trovi dank'al la ret-adreso :

<http://14-18.lecrivainpublic.net>

Inter tiuj dokumentoj troviĝas kontribuado de la mezlernejo en **ETAIN, Collège Louise-MICHEL**, pri germana kampadejo ĉe la ariera fronto. La ilustritaj tekstoj de la geknaboj el la klasoj "3ème" estis tradukataj, kaj en la lingvon de la tiama malamiko, nuntempa partnero, la germana, kaj en la *Lingvon de la Paco*, la *Lingvo Internacia*.

<http://14-18.lecrivainpublic.net/scripts/travail.php?doc=356> :

La teksto en Esperanto ekzistas en pdf-formato (538 Mb) !

Bonan malkovron !

Rimarko HM : Ekzistas prospekto en Esperanto pri "*Centre Mondial de la Paix, des libertés et des droits de l'homme*" (*Monda Centro de Paco, de la liberecoj kaj de la homrajtoj*)

<http://www.centremondialpaix.asso.fr>.

Bedaŭrinde la ttt-ejo mem ne havas E-paĝojn. . . Ĉu iam ?

Hervé MOUGIN

NB (redaktejo de "La Informilo") - Ni gratulu nian amikon kaj samideanon, kiu iniciatis la ĉi-supran elvokitan skip-laboron. Cetere, dank' al li, esperanto mirinde disvolviĝas sine de la mez-lernejo, kiu posedas specifan ret-paĝon en esperanto ! Plue, "ĉerizo sur la kuko", la estro de la mez-lernejo, Joël GRANDJEAN ĵus igis esperantofono, partoprenis la kultur-semajnfinojn en VILLERS-lès-NANCY (raportas pri ĝi) kaj eĉ aperigis trafan artikolon franclingvan en la loka "regionoa bulteno" de Etain. Malkovru ĝin aliloke !

Nilvange (Moselle) ————— ☆

Kubo la bela malkovrigas sian atuton !...

Por 40 personoj el Nilvange la ekonomio kaj historio de Kubo ne plu estas sekreto. La prelegon organizis kune asocioj « *Forum des Citoyens* » kaj « *Esperanto Thionville* », kiuj gastigis Maritza-n *Gutierrez Gonzales* ĵurnalistino kaj animantino de *Radio Havano Kubo* en Esperanto. Tradukis francen nia amiko de *Esperanto Thionville* Bernard Viviers.

Per bildoj Maritza malkovrigis al ni tiun mil facetajn landon, kie enloĝas 11 milionoj da civitanoj. La valo de Vinales estas la plej turista regiono kaj ĉi tie la turistoj ekkonas la ekologian turismon. La tabako, sukero sed ankaŭ nikelo, rumo estas la ĉefaj produktaĵoj de la lando. Pri la kulturo, la tradicia popola muziko estas grava en tiu lando. En multaj kvartaloj oni nomas grupojn de muzikistojn la trobadoroj. La salso naskiĝis en Kubo. Ekde kiam ekstaras la knaboj sur la lito, ili dancas ! Dank'al la 70000 kuracistoj de Kubo la vivespero estas bona ! Por la viroj ĝi estas 74 jara ! kaj por la virinoj 77 jaroj !

Kiel paroli pri Kubo sen paroli pri Fidel Castro kaj Ĉe Gevara. Maritza rakontis pri tiuj legendaj figuroj kaj respondis al demandoj pri la estonco de la Fidel reĝimo. Ŝi parolis pri la usona embargo, kiun la kubanoj spertas ekde 34 jaroj. Tiu situacio ne malgajigas kaj ne malkuraĝas ilin. Estinteco turmentita, estonteco malfacila : Kubo sin turnas al estonteco. Ĝia popolo devenas el diversaj etnoj, kiuj volas montri modernajn bildojn pri sia lando, kiu transformiĝas iom post iom.

Maritza prelegturneis kadre de *Espéranto France*.

Raportas Bruno HENRY de Esperanto Thionville
esperanto-thionville@laposte.net

Noël

La dua filo de niaj karaj geamikoj Bernard kaj Odette BEHRA, Noël, 24 jarojn aĝa, forpasis la 20an de majo 2006 en Parizo. La gepatrojn, la du aliajn filojn Sébastien kaj Timothée, kaj la ceterajn familianojn, ni tutkore kompatas je tiu doloriga sortofrapo.



59a Regiona Staĝo de Esperanto 21 / 22 / 23-ajn de aprilo 2006 en Villers lès-Nancy - Francio

organizita de Esperanto-Nancy-54 en
Maison de l'Asnée, 11 rue de Laxou
54600 VILLERS LES NANCY



"Gustumu tiujn bonajn fragojn!", diris panjo, "Unuafoje ĉi-jare, ni manĝas fragojn... Nepras bondeziri !"

Mi memoras, ke mi ofte aŭdis la ĉi-suprajn vortojn kiel knabo. Mia patrino ŝatis diri tiun frazon ĉi-foje, kiam ni ekmanĝis la unuan frukton aŭ legomon de la ĝardeno: familia kutimo aŭ eta superstiĉo?

Mi pripensis tiun kortuŝan memoraĵon, post mia unua staĝo de Esperanto la 21/22/23-ajn de aprilo 2006 en Villers-lès-Nancy. Por omaĝi mian forpasintan patrinon, necesas ke mi faru bondeziron! Jen do :

"Mi ŝatus iun tagon vidi ĉiujn homojn en la tuta mondo komuniki inter si dank'al la Internacia Lingvo!"



Tiu staĝo en Villers-les-Nancy vere feliĉigis min. Estis por mi bela sperto dank'al la agrabla etoso.

Mi alvenis en Villers vendrede vespere, sed mi malfacile trovis la lokon "La Maison de l'Asnée" kiun la Villers-loĝantoj nomas ankoraŭ "la alta seminario".

En la koridoro de tiu bela granda domo, mi ricevis mian unuan "Saluton!". Mi fiere respondis "Bonan vesperon!".

Mi sciis poste, ke mia unua kunparolanto en Villers estis Jean-Luc Thibias.

En la manĝejo, jam multe da manĝantaj personoj sidis ĉi-tie en amika babilado. Enirante, mi tuj estis akceptata per ridanta afabla virino: Liliane, kiu invitis min sidiĝi. Ŝi demandis al mi diversajn informojn. Mi ĝojis, ĉar mi bone komprenis ŝin. Poste, paro da staĝanoj envenis, kiu eksidis apud mi. Iom post iom, ni interkomunikis... evitante krokodilii!



Post la vespermanĝo, kelkaj personoj vizitis nokte la tre belan Stanislas-placon en Nancio.

La morgaŭan matenon, mi matenmanĝis apud ger-

mana pastro, kiu impresis min per sia bela flua Esperanto. Ni kune babilis pri dieto! Kaŭze de kelkaj superabundaj kilogramoj, necesas ke li strikte observu dieton. Rigardante la blankan panon sur la tablo, li klarigis detale la malavantaĝojn de tro rafinitaj nutraĵoj.

Poste, ni rekuniĝis por aranĝi veturigon por la vizito de la urba akvariario.

Nia grupo konsistis el 60 personoj venintaj el Francio, Germanio, Svisio, Nederlando, Japanio, k.t.p. .

La vizito estis tre interesa: sperta gvidistino klarigis multajn detalojn pri la moroj de la belegaj ekzotikaj fiŝoj. Jean-Luc tradukis ĉiujn frazojn en Esperanton.

Post la tagmanĝo estis proponataj diversaj kursoj: unu por komencantoj, alia por progresantoj.

Mi partoprenis la kurson "konversacio" kies gvidanto estis André Grossmann. Dumtempe, la spertaj esperantistoj atenteme aŭskultis prelegon de André Cherpillod.



Andreo proponis al ni amuzan teatraĵon: "Najbaroj kaj boroj" de Stephan Mac Gill. Tiu teatraĵo estas bona teksto por kompreni subtilecojn en Esperanto. La verkisto ludas per vortoj, kiujn diras la du najbaroj Frik kaj Frak: Frik estas tre entuziasma, festema, pruntema, malordema kaj forgesema persono kun multaj amikoj; male, Frak estas fanatike ordema kaj pedanta persono, kiu konstante purigas sian domon kaj luktas senĉese kontraŭ ĉiuj atencoj de mikroboj kaj polvo.

Unu post la alia, ni legis la replikojn; sekve, Andreo petis klarigojn pri la teksto. Pro la komika rakonto! Ni multe ridegis. Dum la kurso, la babiladoj inter ni estis agrablaj en simpatia etoso. Afable, Andreo korektis la erarojn kaj donis klarigojn. Lia humura pedagogio rapide progresigis nin.

Dum la paŭzo, mi vizitis la libroservon, kie multe da libroj estis prezentataj. Mi trovis ĉi-tie la vortaron, kiun mi bezonis. Samtempe, gazetistino de "Le Républicain Lorrain" intervjuis Jean-Luc. Ŝi ekdemandis al mi, ĉu mi akceptus paroli pri miaj unuaj paŝoj en Esperantio. Mi bonvolis... La morgaŭan matenon, ni legis artikolon en tiu ĵurnalo pri la 59-a Regiona Staĝo; sed mia modesteco suferis, ĉar en la artikolo mian foton la gazetistino elektis!

Post la kurso, ni aŭskultis deklamadon de Roberto. Dank'al sia granda teatra talento, li kortuŝis la mirigitan spektantaron.

Post la vespermanĝo, ni feliĉis spekti koncerton de la fama grupo "Kajto".


Dimanĉe, la kursoj daŭris ĝis la 11-a. Sekve, la tuta grupo estis akceptata en la urbodomo de Nancio.

Kia semajnfino! Mi forveturis hejmen kun belaj bildoj en la kapo kaj kelkaj ret-adresoj por daŭrigi la interkomunikadon. Nuntempe, mi konservas ankoraŭ amikajn ligojn kun simpatiaj samideanoj, kiujn mi renkontis tie.

Estis agrable vojaĝi en Esperantio!

Joël Grandjean

j.grandjean@laposte.net



Kajto estas 4-persona Esperanto-muzikgrupo el Nederlando (Ankie, Marita, Marian, Nanne). La grupo ludas kaj kantas kantojn kun originalaj tekstoj de poetoj el multaj landoj. Ili akompanas sin per diversaj instrumentoj, interalie per gitaro, mandolino, bango, violino, akordiono, flutoj kaj ŝalmoj...

Estis tre agrable distra vespero: "Kajto" esprimas ĝojon, esperon per siaj kantoj; ofte, ili invitas la spektantaron kunkanti. Fojfoje, ili alkras afiŝojn, kie estas skribita la rekantaĵo: tiel estas facile kanti kune kun ili.

59a regiona staĝo de Esperanto en Villers lès-Nancy la 21-22-23-ajn de aprilo 2006



Akcepto en la urbodomo de Nancy

Fotoj: André Grossmann + Frédéric Porretti

Amika tago kaj migrado en Le Thillot en junio 2006

Dimanĉe la 11an de junio okazis en la ĉirkaŭaĵo de Le Thillot la amika tago, kiun refoje Ginette Martin sukcesis tre lerte organizi.

Nia matena rendezuo estis ĉe la urbodomo en Le Thillot. Ni estis pli ol 22 partoprenantoj el Francio, Germanio kaj Meksikio. La unua programero estis vizito al la malnova kupro-minejo de la 16a-18a jarcento. Ni veturis tien per aŭtomobiloj. La gvidistino donis al ĉiuj partoprenantoj kaskon kaj mantelon. De tie ni piediris al diversaj galeri-enirejoj.



Ĉie ni ricevis tre interesajn klarigojn pri la laboro en la minejoj, pri solvendaj problemoj, pri la evoluo kaj la novaj teknikoj uzataj. Ni eksciis ekzemple, ke por bori la rokaĵon per martelo kaj pik-martelo ministo bezonis unu tagon por progresi je 7 cm. Krome la ĉefa problemo estis forigi la akvon per man-pumpiloj kaj pli poste tra flankaj galerioj

La galerioj estis tre mallarĝaj kaj malaltaj kaj la vagonetoj, kiuj rulis sur lignaj relaj estis adaptitaj al tiu mallarĝeco.



Post tiu tre interesa kaj instruiga vizito, ĉiuj veturis al la restoracio *auberge de la Hardoye* en Fresse. Tie oni servis al ni kompletan menuon, bongusta kaj malmultekosta manĝo. La vetero estis vere agrabla kaj varma kun sen-nuba ĉielo. Post la manĝo ni vizitis la kapeleton de "Ves" kaj de tie migradis 40 minutojn en la bela Vogeza naturo kaj survoje trovis akvo-fonton.



Fotoj: André Grossmann


Por fini la tagon Ginette proponis piknikadon en ombra loko, ĉe farmo-domo.

Sur faldeblaj tabloj estis metitaj fromaĝoj, pano, diversaj membakitaj kukoj, akvo kaj kafo, kiujn vogezanoj regalas al ĉiuj partoprenantoj.

Ni dankis al Ginette pro tiu simpatia tago, dum kiu ni eksciis multon pri la malnovaj minejoj kaj ĝuis amikan etoson kaj belan naturon.

A. Grossmann






Universala Kongreso 2006



La itala Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj
subtenas la italan kulturon en Esperanto



La itala Ministerio pri eksterlandaj aferoj en la kadro de la subteno de la itala kulturo eksterlande ĵus aĉetis de *Itala Esperanto-Federacio* 91 ekzemplerojn de la verko "*La gefianĉoj*" en Esperanto, kiun ĝi nun plusendos al ĉiuj *Institutoj pri Itala Kulturo* eksterlande.

Esperantistoj, kiuj havas kontaktojn kun unu el ili, povos trovi ĝin tie post kelkaj semajnoj.

"*La gefianĉoj*" (*I promessi sposi*, en la itala) estas verko de *Alessandro Manzoni*, kiu aperis en la 19-a jarcento, kaj priskribis eventojn okazintajn antaŭ jarcentoj en norda Italujo. Fakte temas pri la mistraktado fare de la tiamaj potenculoj al la tiamaj malpotenculoj, kaj pri la rolo de la eklezio protekte al la popolo (eĉ se foje alianca al la regantoj). Nenio nova sub la suno...

Ĝi aperis en la serio *Oriento-Okcidento* de UEA en la kadro de la laboroj antaŭ la *Universala Kongreso* en Florenco ĉi-jare.

Laŭ informoj el la ministeriaj oficejoj, la aĉeto estas rigardinda kiel nereakta maniero subvencii la laborojn por la ĉi-jara *Universala Kongreso* en Florenco.

... Sur la revenvojo post la nacia kongreso de Rennes...
Halto en Mont d'Huisnes

Impresis nin tiu duon-cilindra, duetaĝa monumento
kun 68 kriptoj... En ĉiu, restaĵoj de 180 soldatoj



germana maŭzoleo-ostejo

" Wenn die Menschen nur wissen würden, wie schwer es ist, verwundet zu sein, zu sterben, alle wären mild und zahm, würden sich nicht in Parteien spalten, keine Meuten aufeinanderhetzen und nicht töten. Aber wenn sie gesund sind, wissen sie es nicht. Wenn sie verwundet sind, glaubt ihnen keiner. Wenn sie tot sind, können sie nicht mehr reden..."

" If people only knew how hard it is to be wounded, to die, they would all be meek gentle, would not split into parties, would not incite mobs to attack one another, and would not kill. But when they are in good health know nothing of this. When they are wounded, no-one believes them. When they are dead, they can no longer speak..."

" Se la homoj sciis, kiel teruras suferi vundojn, kiel teruras forpasi... ĉiuj kondutis milde kaj kviete, ili ne displitiĝus en partioj, ne incitus sin al ribeloj kaj ne interbuĉus sin reciproke. Sed bonfarta homo tion ne scias. Neniu kredas vunditon. Kaj forpasintoj ne plu povas paroli..."

" Si les hommes savaient combien il est horrible d'être blessé, de mourir, tous seraient doux et paisibles, ils ne se diviseraient pas en partis, ne se pousseraient pas à la révolte et ne s'entretueraient pas ! Mais voilà, un homme en bonne santé l'ignore. Personne ne croit un blessé. Et les morts ne peuvent plus parler..." "

Mihajlo LALIC



“ ... Por pligrandiĝo ĉiam pli vasta, mi deziris, ke estu prezentata al vi juniga versio de la hejmpaĝaro de **MONTPELIERO**, tradukita en naŭ lingvojn. Tiel mi klare reasertas mian volon malfermi Montpelieron al la mondo kaj pri la mondo. La lingvoj de niaj ĝemeligitaj urboj estas honorigitaj, sen forgesi niajn okcitanajn originojn kaj Esperanton, la universala lingvo vokacie. Mi tuj deziras memori, ke en 1998 Montpeliero akceptis la 83-an Universalan Kongreson de Esperanto por elmontri la ligon de nia urbo kun la humanistaj valoroj...”

Hélène MANDROUX

Urbestrino

Amikoj de Esperanto kaj retanoj de la tuta monda, jen kio indas fari !

La asocio *Apsike1997* (franclingve : *Réinsertion et Espéranto*) [*Asocio Por Sociala Integriĝo Kaj por Esperanto* — 1997 estas la jaro de la fondiĝo], kies sidejo estas en **Montpeliero**, ege fieras anonci, ke ekde nun **la hejmpaĝaro** de tiu granda urbo de Sud-Francio estas tradukita Esperanten. Jes, vi bone legis : en Esperanton !

Jen la retadreso de la hejmpaĝaro : **www.montpellier.fr**. Nekredeble ! Ĉu ne ? Ĉiu bone memoras, ke Montpeliero estas aparte konata en Esperantujo depost la jaro 1998, kiam ĝi akceptis la *83an Universalan Kongreson de Esperanto*.

Komence en la franca kaj parte en la angla, la hejmpaĝaro de la urbo ĵus estis renovigita, kun tutnova portalo tradukita en la lingvojn de la ses ĝemeligitaj urboj (1). Ĝuste *Apsike1997* proponis tion, ekde 1998, kadre de dosiero de kunlaborad-propono, kiun ni prezentis al la elektitoj. Tio okazis tri monatojn post la U. K. Certe, necesis, ke ni armu nin per pacienco, sed vidu la rezulton. Sufiĉas unu mus-klakado por ke Montpeliero prezentu sin al vi, en **ok lingvoj (2) kaj en Esperanto**. Ĝuste ankaŭ *Apsike1997* plenumis la tradukadon de la hejmpaĝaro en la uson-anglan kaj en la katalunan.

La kvanto tradukota atingis preskau dudek mil vortojn. Kvankam malgranda estas nia asocio, ties projekto tamen ja ambicias. Depost la komenco ni provis labori kiel profesiuloj. Tial, koncerne tiun aferon, ni kontaktis Esperanto-tradukistojn, katalunajn kaj uson-anglajn. Ĉiu skipo tradukis al sia gepatra lingvo el la Esperanta versio, kiun ni mem estis farintaj en Montpeliero. Nia laboro kompreneble estis antaŭe reviziita de André CHERPILLOD, membro de la Akademio de Esperanto. Li estu dankata pro siaj altvaloraj konsiloj.

Sufiĉis poste al niaj partneroj Esperanto-tradukistoj agadi same. Kaj tion ili faris, respektante la kvalit-kriteriojn precizigitajn en kontrakto antaŭe subskribita kun ni. Kaj por fari la tutan laboron, ili estis pagitaj. Ni aldonu, ke en tiu afero, la urbodomo de Montpeliero havis nur unu kunparolanton : *Apsike1997*.

Hodiaŭ komenciĝas por ni -kaj por la lingvo Esperanto - tutnova epoko. Tiu de la malfermo al la tradukistaro kaj simple al la tuta mondo. Dum la unua televidkanalo en Esperanto transsendas, de kelkaj monatoj, sian programon sur la reto -jen iu audaca projekto alia, kiu estis tutcerte nefacile realigebla por ties aŭtoroj, iu brazila skipo de Sao Paulo- la urbo Montpeliero, montriĝas ĉe la rigardo de la tuta mondo per ret-portalo multlingva kaj aparte en la Lingvo Internacia.

Estas tute certe, ke la municipa konsilio, akceptinte fidi nin, ankaŭ faris veton : veton por helpi kaj agnoski nin, sed ankaŭ veton provante iun tradukteknikon malbone konatan. Temas ja pri tekniko uzanta Esperanton kiel pontlingvon, iu tekniko, kiun ni tiel multe laŭdis.

Plian fojon, la municipa decido montras, kiom la urbo estas aŭdacema, kaj estas nedubinde, ke la vojo hodiaŭ sekvata estos poste sekvata de aliaj. Alivorte: « *Kies vico? Kiu estos la urbo, kiu sekvos tiun vojon por internaciigi sian hejmpaĝaron, kaj ankaŭ donos al Esperanto la lokon, kiun ĝi meritas, dum la tumondigo de la interŝanĝoj transformas iom pli ĉiutage la mondon en « planedan vilaĝon ».*

[... / ...]

Tial, *Apsike1997* petas de la tuta Esperanto-movado, ke ĝi agu konsekvence. Ni petas, ke vi iru por viziti la hejmpaĝaron — samtempe vi ekscios multe da informoj interesaj pri la urbo kaj ties historio. Farinte tion, eble vi dezirus veni ĉi tien por restadi kelkajn tagojn. Ni ankaŭ petas, ke vi parolu ĉirkaŭ vi pri tio. Ne nur nuntempe, sed ankaŭ kaj ĉefe post ses monatoj, post unu jaro, ktp. , kaj ke vi rigardu ankaŭ la paĝojn verkitajn en via gepatra lingvo. Ni denove dankas vin, kaj ne forgesu, ke nur kune ni sukcesos.

[... / ...]

Por la tuta estra skipo de *Apsike1997*,
la direktoro : Thierry SALADIN .

1. Louisville, Barcelono, Hajdelbergo, Ĉengduo, Tiberiado kaj Feso.

2. Araba, ĉina, franca, germana, hebrea, hispana, kataluna, okcitana, usona.

GAZETARA SERVO DE SAT-AMIKARO
SERVICE DE PRESSE DE SAT-AMIKARO

NB – (el la redaktejo de « La Informilo »). La urbo Colmar (68000) proponas al la vizitantojn paĝojn en... 10 lingvoj kaj Esperanto ! ... angla, dana, finna, germana, hispana, itala, nederlanda, pola, portugala, rusa.


Appeal for Peace from the top of Mount Fuji

by director *Anatoly Ionesov*. Samarkand. Uzbekistan

... " alvoko al Paco " - kaj ESPERANTO ! - ĉe la pinto de FUJI-monto ...

Pri la okazaĵo raportas nia amiko, samcelano kaj fidela leganto de nia bulteno, *Anatoly Ionesov*... Tre detalita artikolo aperis en anglalingva gazeto « *International Teacher* », kvaronjara periodaĵo (Danlando), internacie distribuata.

Ni dankas al Anatoli, kiu kunsendis okulfrapajn fotojn pri la evento.



En aŭgusto 2005, du esperantistoj de Samarkand (Ouzbékistan) *Anatoly Ionesov* et *Holikberdi Kozimov*, reprezentantoj de la *Muzeo Internacia de Paco kaj Solidaro*, akompanitaj de du japanaj pacifistoj *Ohba Mitsuru* (Yokosuka) et *Takayama Nahohisa* (Tokio) atingis la montpinton de **Fuji-san** kiel ĝi estas nomita, kie ili flutis la emblemojn naciajn de Japanio kaj de Ouzbékistan.

La kvar homoj kiuj komencis la ascensionon la 16-a de aŭgusto ĉe noktomezo atingis la montpinton la 17-a de aŭgusto, la kvaropo jam estis sur la montpinto de Fuji (3776 m).

« *Durante la escalado ni assistis al spektaklo de magnifica levado de suno. De la someto, ĉirkaŭ ni, panoramo impresanta... Desoblankaj nuboj « nageis », tamen ĉi-sube, bone videbla, la kratero nigra de vulkano en estingado.*

Que la Paix se répande sur la Terre ! Cet appel a résonné en espéranto, en japonais et en ouzbègue, lancé du plus haut sommet des montagnes japonaises..

En aŭgusto 2005 samarkandaj esperantistoj *Anatoly Ionesov* kaj *Holikberdi Kozimov* (reprezentantoj de la *Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro* en **Samarkando**, Uzbekio), akompanitaj de japanaj pacifistoj *Ohba Mitsuru* (el Yokosuka) kaj *Takayama Naohisa* (el Tokio) sukcese atingis la montpinton de **Fuji-san** (tiel Japanoj karesse nomas ĝin).

Tie ili flirtigis E-flagetojn donacitajn de *Japana Esperanto-Instituto*, kaj la naciajn flagojn de Japanio kaj Uzbekio.

La montgrimpado de la 4-persona uzbeka-japana teamo komenciĝis je noktomezo la 16-an de aŭgusto, kaj frumatene la 17-an de aŭgusto, la kvaropo jam estis sur la montpinto de Fuji (3776 m).

Survoje al la montpinto ni spektis belegan sunleviĝon, la unuajn sunradiojn... Desur Fuji-montpinto antaŭ ni, malfermiĝis kortuŝa vidaĵo de pitoreskaj lokaj ĉirkauaĵoj. Blankaj nuboj "naĝis" ĉirkaŭ ni, kaj sube videblis estingiĝinta nigra vulkana kratero....

"*Regu Paco sur la Tero*"! ...Tiu-ĉi alvoko eksonis Esperante, uzbeke kaj japane desur la plej alta japana monto...

... la plej alta fervojo en la mondo ! ...



La **Qinghai-Tibeta Fervojo** kun 1956 kilometroj startas de *Xining*, ĉefurbo de Qinghai-provinco en okcidenta Ĉinio, kaj finiĝas en *Lhasa*, ĉefurbo de la Tibeta Autonoma Regiono. Ĝi estas fervojo en plej alta altitudo super la marnivelo kaj la plej longa linio sur altebenaĵo. La Qinghai-Tibeta Altebenaĵo kun ekologio primitiva kaj fragila, situanta 4000 metrojn super la marnivelo, estas nomata "tegmento de la mondo", "tria poluso de la terglobo" kaj "fonto de ĉinaj riveroj". 960 kilometroj de la fervojo sterniĝas en regiono de 4000 metroj super la marnivelo kaj 550 kilometroj de la fervojo en tundra regiono.

La plej alta punkto de la fervojo situas ĉe la pasejo de *Tanggula-montaro* ĉiam kovrata de neĝo en altitudo de **5072 metroj** super la marnivelo, tial ĝi estas nomata "fervojo plej proksima al la ĉielo".

814-kilometra parto de la fervojo inter *Xining* kaj *Golmud* estis jam konstruita en 1979 kaj ekfunkciis en 1984. La 29-an de junio 2001, konstruado de parto de Golmud ĝis Lhasa komenciĝis kaj je la 15-an de oktobro, 2005 plenumiĝis. Nia reta revuo raportis pri tio. La Qinghai-Tibeta Fervojo prove funkcios la 1-an de julio, 2006. Tiam ni detale raportos pri la malfermo kaj funkciado. Bv. sciigi al ni, pri kio vi preferas informiĝi***:

*** sendu viajn inform-petojn al la adreso :

El Popola Ĉinio,
P.O.Kesto 77,
CH - 100037 BEIJING Ĉinio

- 1. Rilatoj inter la Qinghai-Tibeta Fervojo kaj la ekonomia disvolviĝo de okcidenta Ĉinio
- 2. Vidindaĵoj laŭ la Qinghai-Tibeta Fervojo, altebenaĵa kulturo kaj vojaĝlinioj ĉe la fervojo.
- 3. Teknikaj problemoj en konstruado de fervojo sur altebenaĵo
- 4. Diferencoj inter la altebenaĵa trajno kaj ordinara trajno
- 5. Konstruado de la fervojo, karakteroj de altebenaĵa ekologio kaj mediprotektado
- 6. Aliaj temoj



... jen Esperanta Futbal-teamo ! . . .



La retpaĝo de "*La Loko*" nun prezentos bildojn de la "**Esperanta Futbalteamo**", partoprenanta en la *Kopenhaga Artparado* la 20-an de majo.

La partopreno estas parto de la lobiada kampanjo de "*La Loko*" por ke la Esperanta Teamo kvalifikiĝu je la **Mondpokalo FIFA-2010** en Sud-Afriko...

La sekva paŝo en la reklamada turneo estos en Rejkaviko la 17-an de junio. La Esperanta Futbalteamo ofertas internacian futbalon sen nacia ŝovinismo.

Ĝi estas subtenita de la Dana Artfondaĵo. ---Okultrafajn fotojn pri la teamo vi trovas ĉe: <http://www.laloko.org>

"Gerda malaperis !" ... Ne timu... sin oni retrovis !. . .

Post la apero sub formo de instru-libro de tiu fama rakonto verkita de Claude PIRON, jen havinda "DVD" pri aventuro konata tutmonde de ĉiuj esperanto-lernintoj !

Estas ja preta la jam antaŭanoncita filmo "Gerda Malaperis"! . . .

Ĝi estas frukto de longa laboro, lanĉita en la pasinta jaro kaj ĵus finita. La filmo estas farita speciale por la esperantistoj tutmonde. Nia skipo kredas, ke tiu filmo estas grava ne nur por la lernantoj, sed ankaŭ por ĉiuj ni, ĉar **ĝi ekas novan eraon pri komunikado en Esperantujo.**

En tiu ĉi jaro ni fondis la filman entreprenon "*Filmoj Imagu*", kies celo estas produkti bonajn filmojn en Esperanto, ĉar mankas ja tiaj.

La filmon "*Gerda Malaperis*" ni realigis pene, proprapoŝe kaj kun grava helpo de kelkaj afablaj esperantistoj, kiuj apogis morale kaj finance nian projekton. Ni invitas vin esti partoprenanto en tiu laboro.

Ni invitas vin antaŭaĉeti almenaŭ unu ekzempleron de la filmo. Ĝi estas produktita en la formato "DVD" (libera regiono). Via aĉeto helpas nin prepari aliajn filmojn.

Nia skajpo-adreso: **amiko4321**

Linda, kaptinto, Karen kaj Tom post la tendumado

Kontaktu nin !. . .

Por koni nian laboron vizitu: <http://www.imagufilmo.org>
Karen Pereira kaj Joe Bazilio - Retadreso: imagu2@uai.com.br

Fonto: "Ret-Info" - <http://www.eventoj.hu>



NB el la redaktejo de "La Informilo" : ni dankas al Karen kaj Joe, kiuj transdonis la ĉi-suprajn fotojn ĉerpitajn el la aludita DVD



Rusio... La plej amasa kurso finiĝis !

Hodiaŭ per la dissendo de la 19-a leciono finiĝis supozeble la plej amasa en mondo Esperanto-kurso. Temas pri jam menciita en "landa agado" reta konatiga E-kurso, komencita la 4-an de decembro 2005 en tri rusiaj dissendolistaj serviloj *Subscribe. ru*,

Maillist. ru kaj *Content. mail. ru*.

La kurso estis konatiga, do, oni ne atendu pretajn esperanto-parolantojn post ili. La dissendita lecionaro estis maksimume malkomplika kaj kun pretendoj je amuzado: ĝi estis verkita en la formo de fantazia rakonto, kies heroo petveturas en futura kosmo, lernante kaj uzante E-on... Tamen estas agrable noti, ke la abonantaro de la kursoj por hodiaŭ estis **7280** personoj. Do, nun en la ruslingvaj landoj (la kursojn abonis ankaŭ ukrainoj, bjelorusoj, kazahoj, israelanoj ktp) estas multe pli da "saluton-esperantistoj" :-)


Jam estas informoj, ke iuj el ili reaperas en la lokaj ĉeestaj kaj en pli seriozaj retaj E-kursoj.

Amike,

Andrej Grigorjevskij (la instruinto)

... esperanto eniras prestiĝan universitaton ...

“...Karaj Samideanoj,




Kun granda ĝojo, mi volas informi vin, ke la publika universitato "University of New South Wales" ("Universitato de Nova Sud- Kimrujo"), en Sidnejo, Aŭstralio, baldaŭ ofertas *oficialan* kurson pri Instruado de Esperanto.

"University of New South Wales" estas moderna kaj prestiĝa publika universitato, kaj ĝia 'Instituto de Lingvoj' respondecas pri la instruado de estontaj instruistoj de fremdaj lingvoj. La Instituto de Lingvoj jam ofertis diversajn oficialajn kursojn pri instruado de diversaj lingvoj - angla, japana, indonezia, franca, germana, ktp. La kurso por instruado de Esperanto estas nova aldono al la listo.

Trapasinte la kurson, la studento ricevos oficialan profesion kvalifikon, aprobita kaj agnoskita de la loka aŭstralia registaro, kiu ebligas lin/ŝin instrui tiun lingvon profesie - kaj eĉ ricevi registaran financon subtenon por instruado, se disponebla, ekzemple por instrui ĉe etnaj aŭ komunumaj kolegio, aŭ en la "Universitato de la Tria Aĝo".

La kurso daŭras 6 monatojn, kaj kvankam nur part-tempa (lecionoj okazas nur dum 2 vesperoj ĉiu semajne), ĝi estas profunda, kaj inkluzivas:

- * lingva teorio: kio estas 'lingvo', lingvaj trajtoj kaj strukturo, fonetiko, ktp.
- * historio kaj specifaj problemoj de lingva instruado
- * teknikoj kaj metodologioj de lingva instruado, ekde la 19a jarcento ĝis nuntempe
- * analizo de la diversaj necesoj kaj problemoj de lingvaj studentoj kaj stud-grupoj
- * identigado kaj elekto de taŭgaj instru-metodo, tekniko kaj materialo
- * preparo de lecionoj
- * preparo de plena kurso
- * specifaj trajtoj kaj problemoj pri la instruado de Esperanto
- * kaj multe pli!



La kurso havas teorian parton -pli-malpli 100 horojn da lecionoj- kaj ankaŭ praktikan parton: la studento instruos Esperanton al lernanta grupo dum 6 horoj, kaj je la fino de la kurso, devos verki ne nur lecionan planon, sed plenan koheran kaj profesion kurson de Esperanto.

La plejparton de la lecionoj kune partoprenas la studentoj de ĉiuj fremdaj lingvoj, kaj tial, tiuj lecionoj estas instruitaj per la angla lingvo. La lecionoj specife pri Esperanto estos instruitaj aparte al la esperantaj studentoj, de *P-ro Daniel Kane*.

La kosto de la kurso estos inter AU\$3,500 kaj \$4,000. La unua klaso espereble komenciĝos je la fino de Aprilo - kaj finiĝos en Septembro. Se vi loĝas malproksime al Sidnejo, kaj la kurso interesas vin, sciu ke nia esperantistaro de Sidnejo feliĉe pretas aŭ gastigi vin, aŭ helpi vin trovi taŭgan loĝejon.

Krome, la Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo nun ofertas STIPENDION por tiu kurso: se vi pretas labori part-tempe kiel Instruisto de Esperanto por la Federacio, dum almenaŭ 2 jaroj post la kurso, la Federacio pagos la kurskotizon por vi!

La posteno de Instruisto de Esperanto estos por instrui nur kelkajn malmultajn horojn ĉiu semajne - precipe dum la vespero, kaj dum la semajnfinoj - ĉe la renovigita kaj modernigita Esperanto-Domo de Sidnejo, kaj inkluzivas allogan salajron, kaj la oportunon profunde kontribui al la Sidneja movado.

Ĝeneralaj informoj pri la kursoj por instruado de fremdaj lingvoj ĉe la University of New South Wales troveblas - per la angla lingvo - ĉe: http://www.lang.unsw.edu.au/teacher_education/index.htm

Sed senhezite sendu iun ajn demandon pri la kurso, aŭ pri la disponebla stipendio, rekte al mi!

Kun entuziasmaj salutoj... ”

el [landa agado]

fonto: "Ret-Info" <http://www.eventoj.hu>


Igor de Oliveira Couto
prez. de Aŭstralia Esperanto-Asocio
["prezidanto@esperanto.org.au"](mailto:prezidanto@esperanto.org.au)

Amiketoj-talismanoj de Pekinaj Olimpikoj en 2008



Letervesperu en antikva Samarkando !

Aŭguste kaj septembre 2006, samarkandaj esperantistoj okazigos la internaciajn letervesperojn, dediĉitajn al 15-jariĝo de sendependeco de Respubliko Uzbekistano kaj al **2750-jariĝo de Samarkando**, listigita en la registro de la *Monda Heredaĵo de UNESKO*.



Ni atendas viajn gratulmesaĝojn, kaj, se eble, ĈIUSPECAJN (kaj ĉiulingvajn !) materialojn (leterojn, vojaĝrakontojn, gazetartikolojn, librojn, broŝurojn, poemojn, kantojn, fotojn, desegnaĵojn, dokumentojn ktp) pri Uzbekistano kaj Samarkando.

Fakte, ĈION AJN pri la temoj, inkluzive fotojn de stratoj, vendejoj, restoracioj, hoteloj, komunumoj, kompanioj, varoj ktp estos TRE BONVENAJ. La plej interesajn materialojn ni

publikigos en nialanda gazetaro. Ĉiuj senditaĵoj estos eksponataj en la speciala ekspozicio.

Anticipan dankon por viaj kontribuoj !

Salutleterojn kaj alispecajn materialojn bonvolu adresi JAM NUN al:

Anatoli Ionesov,

Direktoro *Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro*

P. O. Box 76, UZ - 140100 Samarkando

Respubliko Uzbekistano

Telefono/ fakso: +998 (66) 233 17 53.

Interreto:

<http://www.aliaplanko.de/urbo/samarkand/muzeo.html>

<http://www.civilsoc.org/nisorgs/uzbek/peacemsm.htm>

http://satamikarohm.free.fr/article.php3?id_article=357

<http://peacetur.freenet.uz>

Retadreso: imps86@yahoo.com

- Represo kaj nacilingvaj tradukoj dezirataj -



Rat-Man, la plej granda heroo MARVEL vivanta, povus baldaŭ paroli Esperanton: okaze de la **91^a Universala Kongreso**, oni estas pripensantaj la eldonon de unikan numeron de la fama komikso dulingve, itale kaj **E-te** !



La eldonaĵo enhavus unu aŭ pli da historioj de Rat-Man tradukitaj al E-to, unu malgrandan historieton omaĝ' al rathomo en la Itala, kaj iujn informojn pri la Lingvo Internacia... bonega okazo por riĉigi sian propran komiks-kolekton, por ekkoni E-ton, kiel studilo por gelemantoj, kiel donaco por komiksemula amiko, ktp.

La proksimuma kosto de la ĉefverko estus 5 EUR.

Kiu estas Rat-Man

Rat-Man estas la plej sukcesa nuntempa bildstria karaktero, kiu foriris de la manoj de itala artisto, *Leo Ortolani*.

Malgranda super antiheroo, *Rat-Man* amuzigas kaj eĉ ridigas siajn legantojn per multe da misokazintaĵoj, kune kun siaj kunroluloj kaj kun famegaj homoj (fantaziaj kaj realecaj).

La flava ratulo nuntempe aperas en 2 magazinoj, estis jam tradukita al la hispana, havas siajn retpaĝojn kaj fan-klubojn, gajnis multe da premioj kaj baldaŭ aperos en televida formo dank'al intereso de la itala publika televido (RAI).

TEJO havas novan paĝaron



Dum sia kunsido en Roterdamo en la semajnfino 2006. 04. 07/09 la Estraro de **TEJO** finaprobis la lanĉon de la nova retpaĝaro de nia organizo. Jam de kelkaj tagoj vi povas vidi ĝin ĉe <http://www.tejo.org/>

Ĝia ĉefarkitekto estas estrarano pri informado Chuck SMITH, kaj ĝi estas bazita sur la enhav-mastruma sistemo *drupal*.

La plano estas dum la ontaj semajnoj finpoluri la enhavon de la konstanta kerno de la paĝaro, kaj en la dua duono de la monato majo, lanĉi ĝian tradukadon en la naciajn lingvojn (tiucele iam funkciis "*jahugrupo*" tejo-tradukado). Poste oni planas vigligi la paĝaron per retaj taglibroj de la membroj, kaj per forumo.

Baldaŭ **TEJO** oficiale lanĉos konkursojn pri nova logotipo, nova(j) maskoto(j) (aldone al la papago *Pepo*), fotografaĵoj taŭgaj por la paĝaro, kaj "*drupala*" aspekt-sĀYemo ("*haŭto*") por la paĝaro. Ekzaktaj kondiĉoj estas ankoraŭ publikigitaj.

Dume ni bonvenigos (oficejo(ĉe)tejo.org) viajn rimarkojn kaj anticipajn sinproponoj por tradukado en la naciajn lingvojn.

--- el [TEJO-Aktuale] ---

Kiam "eksteraj" legantoj ricigas nian bultenon !...

... Iom da vortoj pri muzik-instrumento ...

la guzlo

Guzlo prezentas muzikinstrumenton (muzikilon) unikan en muzika mondo, per kiu oni "guzlas", ne ludas!

En la serba tradicio, popolo ĝin admiregis kaj malŝatis. Tamen guzlo meritis estimadon, kaj ĝi estas ellernata je etnomuzika branĉo, ĉe la beograda plej supera institucio, Muzika Akademio.

En serbaj landoj troviĝas 57 guzlistaj societoj kun ĉirkaŭ 3700 membroj !. Tio signifas, ke eposa tradicio de *Filip Višnjić* kiel popola guzlanto estas viva kaj vigla malgraŭ obstinecoj; ĝi estas forta samkiel estas kontinua vivfadenado.

La guzladon entuziasme salutis ne nur la plej granda rusa poeto *Aleksandar S. Puŝkin* sed ankaŭ la Germano *Jakob Grim*, kaj la granda *Volfgang Gete*, komparante ĝin kun „*Kanto super Kantoj*”.

Eĉ du Francoj entuziasmiĝis per guzlo, verkinte en 1827 libron de poemoj sub titolo „*Guzloj*” (*Prosper Mérimée****). Estas konate ke ankaŭ serba grandulo *Vuk S. Karadžić* pacience vizitadis guzludantojn, enskribadis milojn da versaĵoj por presi ilin poste.

La plej fruktodona el ili estis *Milorad Panić Surep*, kiu enskribis ilin de blinda guzlanto Filip Višnjić kaj eldiranto *Tesan Porugović*.

Ankaŭ unu el multoj, kiuj ŝategis aŭskulti la tradiciajn eposajn kantojn, estis famulo, serbo, kiu naskiĝis en vilaĝo Smiljane en Kroatio, *Nikola Tesla*, kies 150-an jariĝon festas ĉijare la tuta Serbio kaj Kroatio. Oni diras, ke Tesla parkere sciis preskaŭ 40 milojn da versoj de serbaj polpolaj kantoj; li eĉ skribis pri ili en usonaj gazetoj

Pere de guzloj oni prikantas kavalirojn, grandajn batalojn sur Kosovo okazintaĵoj, oni prikantas serbajn bravulojn, pereadon kaj bravaĵojn de niaj praavoj kaj avoj.

Kiel aspektas guzlo? Laŭ vorto el serba vortaro de registro-libro de „origina serba”, ĝi signifas, ke tiu muzikilo posedas nur unu kordon faritan el kelkaj plektitaj ĉevalaj haregoj.. La korpo estas farita el acero-ligno, kaj havas dek unu partojn kaj diversajn ornamaĵojn. Oni guzlas per arĉo el ĉevalharego.

Jadranka Mirić


*** Fakte necesas iom pli detale elvoki la personecon de *Mérimée*... Post kelkaj eseoj, tuŝante teatron, dramon, komedion, kiujn li legas antaŭ amikoj, li eldonigas en 1825 la "*Teatraĵo-n de Clara Gazul*", asertante, ke temas pri verkaĵo de hispana aktorino...

Senskrupule li kun modesteco klarigas, ke li estas tradukanto kaj eldonanto de "*la Teatro*". Spite al malgranda disvendado de la verkaĵo, ĝi famigis la aŭtoron...

En 1827 li denove mistifikas per eldono de "*La Guzla*", anagramo de "*Gazul*". Ĉifoje *Mérimée* estiĝas itala rifuĝinto kaj prezentas "*La Guzla-n*" kiel aron da iliraj kantoj. Granda sukceso por tiuj baladoj, verkitaj en du semajnoj helpe de kelkaj iliraj vortoj kaj supra okulumado al du aŭ tri lokaj

libroj... Sekvis nova, neimagebla sukceso. La baladojn oni tradukis germanlingven, eĉ Puŝkin ruslingven, kiu eltrovis en la "*Kantoj*" ian strangan kaj originalan allogecon !...





Art. 2. 8 de la Ĝenerala Regularo de UEA: "*Individua membro, kiu ne rekotizis por difinita administra jaro, ĝuas membroservojn ekde 1 januaro de tiu jaro sole lau decido de la Direktoro de la Centra Oficejo.*"

Je 28 februaro 2006 UEA havis **4091 individuajn membrojn**. Tio estas je 221 pli ol je 28 feb 2005. Estas agrable konstati la diferencon, sed estas tro frue por prognozi, ĉu ankaŭ jarfine la membronombro estos pli granda ol pasintjare. La nuna diferenco parte rezultis el pli efika administrado en la Centra Oficejo. Mi bedaŭras, ke Steve Breŭer kaj 2000 aliaj pasintjaraj membroj ankoraŭ ne kontribuis al la diferenco, sed espereble ili kotizos baldaŭ.

Kompreneble estus komforte, se iujn servojn eblus uzi ankaŭ en periodo, kiam oni ne jam rekotizis, sed ju pli longe tio eblus, des malpli tio instigus al frua rekotizado. UEA instigas (re) kotizi frue, ĉar tio gravas el multaj vidpunktoj financaj kaj administraj, por ne paroli pri avantaĝoj al la membroj mem. Ke nur 2/3 de la membroj jam kotizis, ne estas ideale. Triono mankas. Ke la situacio tamen estas pli bona ol antaŭ unu jaro, eblis parte ankaŭ pro la devo rekotizi por povi konsulti la retan Jarlibron post januaro. Tiu instigo mankis pasintjare.

Bedaŭrinde, *parto de la membroj ĉiukaze ne remembrigas*. Malfruigo de la limdato por plu ĝui membroservojn pligrandigus tiun parton. Mi ne teoriumas, sed mi scias tion surbaze de longa sperto pri la kotizkonduco de membroj. Iam oni sendis eĉ la martan numeron de la revuo al nepagintoj, sed la spertoj igis rezigni pri tio. Mi ne intencas ŝanĝi la nunan praktikon, sed mi daŭre pensas pri manieroj allogi al pli frua kotizado kaj bonvenigas ideojn pri tio. Kelkaj unuopaj kazoj ne pravigas ŝanĝi la ĝeneralan praktikon, kaj eĉ multaj kazoj ne pravigas tion, kiam ilia kialo estas provizora kaj ne struktura. Ĉiujare mi tamen faras esceptojn en kelkaj specialaj kazoj, sekvante la praan finnan principon, ke en iuj konkretaj situacioj leĝo devas cedi al la ordinara prudento.

Pri tio, ĉu pagi la kotizon tra sia landa asocio au rekte al la CO, UEA ne faris nek faros rekomendon. **Ĉiu estas libera pagi tiel, kiel estas plej facile kaj konvene**. Nur 20 el la 65 landaj asocioj entute peras UEA-kotizojn. Plej ofte la peranto estas individua persono. En kelkaj landoj estas du perantoj, en Rusio nun eĉ tri. Por krei pli da kanaloj por pagoj al UEA, ne nur por kotizoj, UEA de longe havas kontojn en kelkaj landoj. De multaj jaroj eblas pagi ankaŭ per kreditkarto, lastatempe ankaŭ per *PayPal*. Pliaj manieroj certe aldoniĝos. La ekzisto de alternativaj pagmanieroj ankaŭ instigas la perantojn labori pli rapide kaj efike. Malkontenta "kliento" ja povos en posta jaro pagi rekte al UEA kaj sekve la peranto riskas perdi la makleraĵon, kiun UEA pagas pro la peritaj kotizoj. Iom da konkurenco efikas nur pozitive.

Osmo Buller

ĝenerala direktoro de UEA

"POSAMIKO" -- Nova eldonaĵo de www.edukado.net, verkita de *B. Allèe* kaj *K. Kováts*



La kajereto entenas kolekton de ekzercoj kaj memorigiloj, kiuj pretiĝis laŭbaze de materialoj el la METIEJO kaj LERNILOTEKO de nia paĝaro. La poŝforma eldonaĵo (A6) ne estas strukturigita lernolibro laŭ la klasika senco. Ĝin konsistigas gramatikaj resumoj, tekstetoj, kelkaj ekzercoj kaj laŭtemaj



bildvortaroj riĉe kolorilustritaj.

La vinktitita libreto estas 40 paĝoj, (mal)granda kaj praktika. Ĝi bone povas servi kiel poŝlibreto helpa al infanaj au plenkreskaj kursanoj je komencanta kaj komencinta niveloj, aŭ **kiel varbcelaj donacoj kaj propagandiloj**.

La premiero okazos dum UK, kie pere de ĝia aĉeto oni rajtas ankaŭ partopreni en la 4-era serio de paroligaj kursoj. La eldonaĵon ni disponigas ene de *edukado.net* kontraŭ 5 eŭroj.

Se vi intencas antaŭmendi pli grandan kvanton el la libretoj, bonvolu kiel eble plej rapide anonci vian antaŭmendon ĉe katalin.kovats@wanadoo.nl. Ni atentigas, ke eĉ je mendo de pliaj ekzempleroj ni ne povos doni rabaton, ĉar la indikita prezo jam estas favora.

Por ŝpari la sendokostojn oni povas transpreni la librojn dum UK au dum aliaj grandaj E-aranĝoj.

Atentu! Pri mendoj de unuopaj ekzempleroj ni okupiĝos nur autune!

La eventualajn profitojn ni intencas reinvesti por plibonigi la paĝaron. Por povi helpi al interesuloj de nepagipovaj landoj ni entreprenas subtenaranĝon, t. e. kolekti petojn de donacekzempleroj kaj akcepti donacpagojn por tiu celo. Ne ĝeniĝu peti kaj doni!

Ni invitas vin rigardi kelkajn paĝspecimenojn kiuj videblas en la paĝara sekcio: *POŜAMIKO*

<http://www.edukado.net/pagina/Posxamiko/15173//>.

Ni atendas viajn mendojn kaj eventualajn subtenojn.

<http://www.edukado.net/pagina/%3Cb%3ESubtenu+nin%21%3Cb%3E/14097//> !

Ĝis revido dum unu el la someraj aranĝoj.

Amike,

Katalin Kovats, redaktoro

Cagliostro

Li diradis al si "**grafo Cagliostro**" kaj certigadis, ke li estas italo. Li diskonigadis pri si, ke li revenas el Ruslando, kie li kuracis filon de imperiestrino Katarina la II-a. Do, la famekonata kuracisto uzanta tute novajn metodojn, liveradis laksigajn teojn, terpinoleojn, eliksirojn kaj egiptan vinon. Li ankaŭ aranĝis spiritistajn seancojn, ĉe kiuj li metis sur la patientojn siajn manojn. Pli malfrue li resanigis la potence influigan kardinalon kaj princon **ROHAN**. En tiu tempo li akiris tioman gloron, ke oni pri li parolis ĉe la reĝa kortego en Versailles. Laŭdire li estis grandeg-statura kun plenaj vangoj, kvankam li ĉiam asertis, ke li preskaŭ nenion manĝas. Li vestis sin modeste, sed aliflanke prezentadis sin fiere – laŭte laŭdis iajn scipovojn, ne nur medicinajn. Ekzemple li fanfaronis, ke li kapablas krei oron kaj juvelojn kaj ke li posedas ŝlosilon al eterna juneco. Oni eĉ kredis, ke li estas 300-jaraĝa. Laŭdire li subiĝis al speciala terapio, kiun konis nur li mem. Krom ĉio, li valorigadis sin kiel aŭguristo. En Strasburgo li hipnotis geinfanojn kaj junajn virinojn; pere de medioj li antaŭdiris daton de morto de la imperiestrino Maria Terezia kaj la daton de naskiĝo de estonta tron-heredonto.

Baldaŭ post alveturo Francion Cagliostro estis konsiderata grava kaj estimata personeco kaj por siaj servoj li gajnadis grandajn monsumojn. Post restadoj en Liono kaj Bordeaux en 1485 li ekloĝis en Parizo. Subtenadis lin la kardinalo **Rohan**. Poste la nobelaro, politikistoj, intelektuloj, ĉiuj gravaj personoj sopiris tiatempe konatiĝi kun la dotita italo. **Cagliostro** do prezentigis tre bone. Li uzadis vicon da arabaj sentencoj sen ties traduko kaj li mem pri si parolis en la tria persono. En Parizo ĉirkaŭ li kungrupiĝis multe da admirantoj. Malgraŭ tio li akiris eĉ multajn enviulojn kaj malamon. Kiam evidentiĝis, ke li estas enmiksinta la aferon kun koliero, liaj kontraŭuloj triumfis. Kune kun Cagliostro kaj pluj komplicoj, la grafino Jeanne de Valois disvastigis legendon pri malamegata reĝino Marie Antoinette, ke ŝi havas intimajn kontaktojn kun la kardinalo **Rohan** kaj ke ŝi postulas de li diamantan kolieron. Sed la komploto estis malkaŝita, la kardinalo liberigita, sed la grafino finis en karceron. La proceso estis interesa pro tio, ke la publiko finfine eksciis pli multe pri la ververa identeco de Cagliostro.

Joseph BALSAMO

Ekde lia alveno en Strasburgon, pri lia deveno rondkuradis la plej strangaj legendoj. Onidire li estis filo de portugala-devena judo, kiu fariĝis direktoro de minejo en Brazilo. Li estis



konsiderata kiel posteulo de napola perukisto, la aliaj rakontis, ke li estis edukata de ia pastro en koridoroj de egipta piramido. La plua grupo en li vidis nelegitiman filon de reĝo Ludoviko XV-a. Krom tio Cagliostro ĉiam certigadis, ke li devenas el nenia epoko kaj el nenia loko. Sed en vereco el ĉio sekvis, ke la viro, kiu (el nenie) por la samtempuloj estis tioma enigmo, en realeco nomis sin **Joseph BALSAMO** kaj naskiĝis la 8. 6. 1743 kiel infano de komercisto el Palermo. Li laŭdire kleriĝadis en franciskana monaĥejo, sed pro malbona konduto li estis eksigita. Kiel juna viro li vendadis en italaj urboj propramane pentritajn falsaĵojn de famekonataj verkoj. Li estis akuzita kaj devis transloĝiĝi, ŝanĝi sian identecon. En 1768 en Romo li edziĝis al **Lorenza Feliciana**, inteligenta kaj ambicia virino, kiu kiel lia kunkulpulino akceptis la nomon **Seratina**. Ili travojaĝadis kune tutan Eŭropon, en neniun urbo ili restis pli longtempe. Ĉiam baldaŭ post la alveno ili estis akuzitaj pro spionado aŭ ŝteloj ktp.

FINA STACIO: LA INKVIZICIO

La proceso kontraŭ **Cagliostro** finiĝis kiel ellandigo el Francio. Li transloĝiĝis al Romo, sed tie li denove preskaŭ tuj estis malliberigita kaj starigita antaŭ la inkvizician juĝon pro magio, herezo kaj framasoneco. La juĝo kondamnis lin al morto, pli poste la puno estis mildigita je ĝismorta malliberejo en Sankta Leo proksime de Romo. Kiam li en 1795 mortis, oni tuj komencis spekuladi. Ĉu li eble ne estis sufok-murdita? Ĉu li ne povis fuĝi Rusion aŭ Amerikon? Sed restas la fakto, ke: kiam estis lia tombo malkovrita, nenia kadavro estis trovita. La fino de la vivokuro de Cagliostro restos versimile por ĉiam ia enigmo, sekreto.

Sujet: "Rien n'est aussi stupide que l'intelligence orgueilleuse d'elle-même" (Mikhaïl Bakounine).

Date: Wed, 03 May 2006 09:18:50 +0200

De: Masson Henri <espero.hm@wanadoo.fr>
:SAT-Amikaro / Espéranto-Informations

Pour: info@rencontres-arles.com

Monsieur Barré,

(...) "*un sabir visuel aussi stupide que l'espéranto...*", avez-vous écrit sur le site des *Rencontres d'Arles* <http://www.actuphoto.com/photographie_3211>.

L'espéranto n'apparaît stupide, voire inutile qu'à ceux qui n'ont rien compris à sa vocation, à ceux qui ne savent pas s'en servir. Nul ne peut se flatter d'ignorer jusqu'à son ignorance.

Ce qu'il y a de plus stupide, c'est d'espérer agrandir le prestige de la langue française et des *Rencontres d'Arles* en tenant des propos dévalorisants à l'encontre de l'espéranto.

Le propre des gens stupides est de ne jamais faire de recherches, de ne rien vérifier, de se contenter de répéter ce qu'ils ont entendu dire. Leur seule référence est le oui-dire.

Il y a déjà bien longtemps que des personnalités de renommée internationale ont vu dans cette langue une idée géniale, l'aboutissement d'un rêve de philosophes et d'humanistes tels que Descartes, Leibniz, Vivès, Comenius. Toute personne qui a accès à Internet peut faire des recherches avec le mot clé "esperanto" combiné avec ces noms de philologues, de linguistes, d'écrivains, de pédagogues, de prix Nobel, etc. : *Max Müller, Michel Bréal, Antoine Meillet, Edward Sapir, Mario Pei, Pierre Bovet, Léon Tolstoï, Jules Verne, Henri Barbusse, Maurice Genevoix, Umberto Eco, Albert Jacquard* et beaucoup d'autres, mais aussi avec les mots "prix Nobel", "Unesco", etc.

- Le seul mot clé "esperanto" sur *Google*, fait apparaître **130 millions** d'occurrences.
- Des radios de portée internationale, telles que *Radio Chine Internationale, Radio Pologne Internationale (Radio Polonia), Le Vatican, Rome*, etc, ont compris que l'espéranto leur permet d'atteindre un public ouvert aux échanges internationaux et disséminé sur tous les continents. Voir <<http://osiek.org/aera/>> en plusieurs langues.
- Une littérature importante se développe dans cette langue. Des ouvrages peuvent même être téléchargés gratuitement sur : <<http://esperanto.luin.nu/eLibrejo/>> ...
- La version de l'encyclopédie libre "**Wikipedia**" en espéranto occupe la 16ème place par le nombre d'articles, même devant des langues parlées par un nombre beaucoup plus grand de locuteurs : 43 334 articles en ce 3 mai 2006 sur <<http://eo.wikipedia.org/wiki/>>...
- Il est possible de découvrir une multitude de facettes et d'applications de cette langue par des recherches combinant le mot "esperanto" avec un nom de lieu, de personne, de domaine d'activité (nombre d'occurrences indiqué après) : turismo 789 000, scienco 143 000, komerco 79 800, literaturo 299 000, arto 121 000, muziko 233 000, politiko 192 000, paco [paix] 152 000, esplorado [recherche, exploration] 208 000... (ces recherches peuvent être faites en français aussi).

Ce qui est stupide, c'est de ne pas se poser de questions sur les raisons pour lesquelles "*les industries culturelles sont le premier poste exportateur de l'économie des Etats-Unis*". A Toronto, lors d'un congrès de SAT, association socio-culturelle dont la langue de travail est l'espéranto depuis sa fondation en 1921, un syndicaliste américain m'avait dit : "*celui qui impose sa langue impose l'air sur lequel doivent gesticuler les marionnettes*".

Condamner l'alternative que représente l'espéranto, c'est aller tout à fait dans le sens du souhait exprimé par David Rothkopf, un ancien conseiller de l'administration Clinton : "*Il y va de l'intérêt économique et politique des États-Unis de veiller à ce que, si le monde adopte une langue commune, ce soit l'anglais; que, s'il s'oriente vers des normes communes en matière de télécommunications, de sécurité et de qualité, ces normes soient américaines; que, si ses différentes parties sont reliées par la télévision, la radio et la musique, les programmes soient américains; et que, si s'élaborent des valeurs communes, ce soient des valeurs dans lesquelles les Américains se sentent à l'aise.*" "In Praise of Cultural Imperialism ?", "**Foreign Policy**", n° 107, Été 1997, pp. 38-53.

L'écrivain François Cavanna a écrit très justement "*On me dit que l'espéranto, au vocabulaire trop européen, ne ferait pas l'unanimité. Or, l'anglais, irrésistiblement, s'impose... Il n'est pas particulièrement simple, ni logique ! Ils ne veulent pas de l'espéranto ? Ils auront l'anglais. Tant pis pour leurs gueules.*" ("**La belle fille sur le tas d'ordures**" (Ed. Archipel).

Lors de la semaine de la langue française et de la Francophonie, j'ai eu l'occasion de prononcer une conférence sur le thème : "*Quel parti la langue française peut-elle tirer de la défense et de l'illustration de l'espéranto ?*"

<<http://www.esperanto-sat.info/article708.html>>

La défense du français, avec vous, c'est plutôt mal Barré...

C'est triste pour la bonne ville d'Arles.

Bon, on ne va pas en faire un saucisson !

Veuillez agréer, Monsieur, l'expression de mes sentiments distingués.




El nia libroservo

Informoj



⇒ La libroservo partoprenos la aŭtunan staĝon en Baden Baden la 20/22ajn de oktobro 2006. Se vi volas certe trovi deziratan libron tie, mendu ĝin antaŭe al la adreso poŝta aŭ reta de la libroservo (Libroservo 37 rue Pierre et Marie Curie FR 54500 VANDŒUVRE) libroservo.efe@wanadoo.fr

Nove alvenintaj libroj pri lingvo kaj esperanto movado



Historio de la universala lingvo de Volapuko - lingva historio, 52 p, Johann Schmidt, *La Blanchetière* **6,00 €** Historio de la alia internacia lingvo naskiĝinta kelkajn jarojn antaŭ Esperanto.

Historio de Esperanto, movado, 128 p, **Korjenkov**, *Sezonoj* **12,00 €**. Nova libro pri historio de la internacia lingvo. Post cent pagxoj pri la movado, de ĝia naskiĝo ĝis nun, kelkaj paĝoj prezentas la vivon kaj agadon de kelkaj famaj geesperantistoj



Sed homoj kun homoj, movado, 220 p, **Sikosek**, *U.E.A.* **30,00 €**. Historio de la 90 universalaj kongresoj kiuj sinsekvis de Boulogne-Sur-Mer en 1905 ĝis Vilno en 2005

Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj, movado, 16 p, **M. Boulton**, *Sezonoj* **1,80 €**. Teksto de la prelego de la fama brita verkistino dum la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 27an de novembro 2004, kiam ŝi ricevis la premion Onisaburo.



Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon

- per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDŒUVRE (uzante la dorsflankan aŭ alipaĝan mendilon)

- per e-poŝto al [«libroservo.efe@wanadoo.fr»](mailto:libroservo.efe@wanadoo.fr)

- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj (maksimume 3,58 euroj por adreso en Francio))

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031

97 BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo



Jus alvenintoj



Unuiĝintaj Nacioj Venu kun mi!, Informilo, 36 p, Nane Annan *Izvori.*, **7,80 €**. Per fotoilustrita libreto, la edzino de la ĝenerala sekretario klarigas al la infanoj, kio estas Unuiĝintaj Nacioj.

Homaj rajtoj, Demandoj kaj respondoj, 142p, Levin, U.E.A. **9,90€**, Bazaj informoj pri ĉefaj instrumentoj de homaj rajtoj, pri proceduroj por ilia realigo, pri aktivaĵoj de organizaĵoj por antaŭenigi kaj protekti homajn rajtojn.




Kio estas demokratio? Demandoj kaj respondoj, 144 p **Beetham / Boyle U.E.A.**, **9,90 €**
80 respondoj al demandoj pri demokratio.

Enprizonigo societo, 152 p, **Cesar Barros Leal, Edições Democrata Rocha** **6,90 €**
Pripensado pri la enprizonigo kaj la eblecoj uzi neenprizonigajn punojn.



Pasteĉo-Humuro, 168 p, **Johansson Bero** **9,00 €**
22 imitaĵoj de la tekstoj de famaj esperanto verkistoj

La Fotoalbumo-dua volumo Memoraĵoj 168, **Steele, I.E.M.** **15,00 €**
Komentoj de Trevor Steele pri fotoj. Sekvo de la unua albumo aperinta en 2001




Vivbruligita (honorkrimo) Dokumento 192 p, **Suad, S.A.T.** **15,00 €**. Traduko de franclingva libro, kie la aŭtorino simple priskribas la kruelean sorton, kiu trapis gxin en ŝia lando, kie oni blinde obeas terurajn kutimojn

La vivo de Henriko Kvina Teatraĵo, 160 p, **Shakespeare, U.E.A.** **12,00 €**.
traduko de fama verko de la angla verkisto



Libroj de André Cherpillod



- 1: **Po : la diabla vorto**, 20 p, André Cherpillod, *memeldono*, **3,30 €**. Klarigoj pri la malbone konata vorteto.
- 2: **Nepivaj vortoj**, 182 p, André Cherpillod, *memeldono*, **15,00 €**. Listo de 6000 vortoj ne troviĝantaj en PIV
- 3: **Etimologia vortaro de la propraj nomoj**, 230 p, André Cherpillod, U.E.A., **19,50 €**. 4313 etimologiaĵoj.
- 4: **Vortaro Volapük-Esp kaj Esp-Volapük**, 208p, André Cherpillod, *La Blanchetière*, **15,00€**. Ponto inter du internaciaj lingvoj!
- 5: **La misteroj de la ĉina skribo**, 82 p, André Cherpillod, *La Blanchetière*, **7,80 €**. Klarigo pri alispeca skribo.
- 6: **L'extraordinaire diversité des langues** 104 p, Marie-Christine Body kaj André Cherpillod, *La Blanchetière*, **9,00€**. Komparo de la diversaj manieroj trakti 22 lingverojn en pluraj lingvoj.
- 7: **Balenoj, delfenoj kaj aliaj mirindaĵoj de la oceano** 58 p, André Cherpillod, *Memeldono*, **6,00 €**. Pri maraj mamuloj
- 8: **Le Plessis-Bourré kaj alhemio**, 40 p, André Cherpillod, *La Blanchetière*, **4,80 €**. Pri kastelo en kiu iam loĝis alhemiiisto.
- 9: **Historio de farmobiena servistino**, 36p, Guy de Maupassant, *La Blanchetière*, **4,50 €**. Traduko de rakonto de Maupassant.
- 10: **Jana d'Arko ĉe la ŝtiparo**, 140 p, Paul Claudel, *Memeldono*, **12,00 €**. Traduko de teatraĵo de Paul Claudel.
- 11: **Mateo Falkono**, 28 p, Prosper Mérimée, *La Blanchetière*, **3,90 €**. Traduko de novelo de Prosper Mérimée.

MENILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

-
-
-

al jena adreso:


S-ro/ino

-


En

la

Subskribo:



DISTRANGULO



Stvbrnz ----- *


Sub tiu kodigita teksteto vi malkovros pensigan citaĵon de *Armand Salacrou*, franca verkisto (teatraĵoj). Ĉiuj literoj estas anstataŭigitaj per aliaj. Ekzemple, ĉiuj **a** de la citaĵo fariĝis **b** en la enigmo.

i **b** k v p r u f a d a g b l p b k k c b f

m p b l n a ŝ r f e c b j c n c b l k e s n

v b k e r f m a k r u f g a o c p c f r u

... omaĝe al J. Rouxel, franca desegnisto, inventisto de la "ŝadokoj" kaj al Cl. Pieplu, kiu komentis dum jaroj iliajn stultajn devizojn ...



"... Pli valoras pumpi, ec se nenio okazas, ol riski ion pli gravan rezignante pumpadon ..."

solvoj de la lastaj enigmoj (N° 133)

- 1/ silab -enigmo : *la homo pli kaj pli laboras por vivi senpene*
- 2/ krado de la liter-sudoko

S	P	E	T	O	N	R	A	★
A	★	R	E	S	P	T	O	N
O	N	T	R	A	★	E	S	P
P	E	S	N	T	O	★	R	A
★	R	A	P	E	S	O	N	T
N	T	O	A	★	R	S	P	E
E	S	P	★	R	A	N	T	O
R	A	★	O	N	T	P	E	S
T	O	N	S	P	E	A	★	R

La edzino forlasas la banĉambro kaj finfine liberas la lokon por la edzo, kiu komencis malpacienĉiĝi... Subite, aŭdiĝas sono ĉe la ĉefa enirpordo.

La virino provas rapide volvi la sekig-tukon ĉirkaŭ sin, malfermas la pordon... kaj rekonas Petron, la najbaron... kiu memevidente surpriziĝas antaŭ la kvazaŭ duonnuda ulino...

„Hum, kara Paŭlino... -Petro estas iagrade ŝerculo- ... mi donas al vi 800 eŭrojn, se vi faligas la sekig-tukon...”

Unue ŝokita, Paŭlino ridetas pro la ŝerco propono... sed fulme cerbumas kaj mezvoĉe murmuras... „800 eŭroj... jen tamen interesa sumo...”, kaj konstatante, ke daŭre ŝprucas avo en la banĉambro... ŝi lasas la tukon piedon...

Tiam aŭdiĝas voĉo el la banĉambro; „Karolino, pri kio temas?

- Ne gravas, nur Johano, nia najbaro, kiu deziris vidi cin!

- Jes ja, mi preskaŭ certas, ke li venis por redoni al mi la 800 eŭrojn, kiujn mi pruntedonis al li antaŭ unu monato...”



RENNES – Nacia Kongreso - ... dum la akcepto en la urbodomo



photo A. Grossmann



photo P. Denis

post-kongresa ekskurso: le Mont St-Michel